Jarkunveno de Grupo Esperantista de Trondheim, 30an de marto 2020 en Interreto per la vidkonferenca programo Skype

1. Aprobo de la kunvoko
La kunvoko aprobiĝis. Pro la pandemio de KOVIM-19 la jarkunveno devis okazi en Interreto.

2. Malfermo de la jarkunveno
La prezidanto malfermis la jarkunvenon.

3. Aprobo de la tagordo
La jarkunveno aprobis la tagordon.

4. Elekto de kunvena prezidanto, raportanto kaj 2 subskribontoj de la protokolo
Torstein Kvakland elektiĝis kiel kunvena prezidanto. Kiel raportanton oni elektis Jardar Eggesbø Abrahamsen. La protokolon subskribos Herman Ranes kaj Judith Parelie Abrahamsen.

5. Jarraporto 2019
Oni laŭtlegis la jarraporton, faris kelkajn malgrandajn modifojn kaj aprobis ĝin.

6. Jarkalkulo 2019
Kasisto Ulf Stenhaug prezentis la jarkalkulon. Ni tralegis la jarkalkulon. Revizoro Bergny Dahl kontrolis la jarkalkulon kaj trovis ĝin en ordo. La jarkunveno aprobis la jarkalkulon.

7. Elektoj
La elekta komitato nek ĉeestis nek faris proponon. La jarkunveno reelektis ĉiujn:

Prezidanto:	Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto:	Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario:	Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano:	Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto:	Christian Fossen (reelekto)

Revizoro: Bergny Dahl (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)

La jarkunveno decidis proponi reelekton de la elekta komitato, kaj poste la jarkunveno elektis laŭe:
Jørgen G. Bosoni (reelekto, kondiĉe ke li pagos kotizon) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

8. Envenintaj proponoj
Neniu propono envenis.

9. Fermo de la jarkunveno
La prezidanto de GET fermis la jarkunvenon esprimante esperon ke ni povos varbi heredontojn de la klubo.

Post la jarkunveno ni konversaciis pri la ĉiutaga vivo dum la pandemio.

Ĉeestis 6 membroj kaj unu infano.

Raportis: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Subskribis: Herman Ranes Judith Parelie Abrahamsen

Styret på norsk

Under sak 7 på årsmøtet i Grupo Esperantista de Trondheim (Trondheim esperantoklubb) 30.3.2020 vart dette styret valt:

Leiar: Torstein Kvakland
Kasserar: Ulf Stenhaug
Sekretær: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Styremedlem: Herman Ranes
Vara: Christian Fossen

Referent: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Underskrivarar: Herman Ranes Judith Parelie Abrahamsen